



BULLETIN MENSUEL

Organe de la Fédération Espérantiste Normande

ÉDITÉ PAR LE GROUPE DE ROUEN

NORMANDA STELO.



Rédaction & Administration

MM. Liébard et Leroux

41, rue de la Vicomté, Rouen

Abonnements

Un an 2 fr. (0,80 spm.)

Un Numéro 0.20



Grâce à l'ardeur des **ESPERANTISTES** pour leur langue
LES ANNONCES DE "NORMANDA STELO"

sont lues aux quatre coins du Monde, cependant, leur prix est des plus modérés

1 page, une fois 20 fr.; un an 200 fr.
 1/2 page " 12 fr.; " 120 fr.

1/4 page, une fois 8 fr.; un an 80 fr.
 1/10 page, " 3 fr.; " 30 fr.

Esperantistoj kiuj al ni havigas
 5 novajn abonintojn ricevos
 tutjaran senpagan abonon

Grupoj kiuj peras tutjaran
 anoncon ricevos monate
 10 ekzemplerojn de **Normanda Stelo**

NORMANDA STELO est envoyé gratuitement chaque mois à titre de propagande à de nombreuses sociétés, aux Syndicats d'initiative, aux Chambres de Commerce, aux principaux fonctionnaires, Consuls, Négociants, Industriels, Hôteliers, Cafetiers, Coiffeurs, aux Fédérations Espérantistes, à de nombreux Groupes Espérantistes de France et de l'Etranger.

Fait un service régulier d'échange avec les autres journaux & revues

ANTHRACITE, CHARBONS & COKES

BOIS
de Chauffage
 & D'ALLUMAGE
Charbons de Bois

Maison V. FIEFFÉ, fondée en 1900

G. CHANUT, S^r

40, Rue Lafayette

TOURBES

ROUEN

Téléphone 7.66

DÉMÉNAGEMENTS

Téléphone 7.66

13^A, Route
 de Neufchatel
 ROUEN

BIENAIMÉ

Près de la Place

GARDE-MEUBLES

Beauvoisine

ÉNERGIE & LUMIÈRE

17, rue Jeanne-Darc

ROUEN 8 8 8 TÉL. 14-11

ÉCLAIRAGE par tous systèmes

..... Electricité, Gaz, Essence

Lampe « KLAROS » à filament métallique

FORCE MOTRICE

.... Installation. Dynamos, Moteurs

CIDRES, BOISSONS de CIDRE

fermentés, prêts à boire ou sortant du pressoir, pour bouillir en cave au gré du client.
 Petites et grosses provisions.....

MAISON DE CONFIANCE

BRASSERIE DES PRAIRIES ST-GERVAIS

LÉON TÉNIÈRE

99, Avenue du Mont-Riboudet, ROUEN

BELLE JARDINIÈRE, M^{on} LEGRAND, Frères

52, rue Jeanne-d'Arc, rue Grosse-Horloge, 105, ROUEN (Téléphone 5.31)

Habillements tout faits et sur mesure, tailleurs Hommes et Dames

ANNEXE : rue Jeanne-d'Arc, pour la Cravate, Cois, Bretelles, Ganterie, Parfumerie, etc.

Remise 5 % aux Espérantistes, sur présentation de leur carte ou de leur insigne

GALVANISATION ROUENNAISE

Rue de la Ferme prolongée

TÉLÉPH. 14.37

GALVANISATION À FAÇON

E. GOMICHON

PLAQUES ÉMAILLÉES EN TOUS GENRES

TÉLÉPHONE 14.37

18 et 20, Rue Lafayette — ROUEN

TÉLÉPHONE 14.37

LA PLEJ TERURA RAKONTO

(Laŭ Villi)

Ĉiu gasto devis rakonti la plej teruran aventuron de sia vivo. Oni rakontis multe, longe kaj, kontraŭ la kutimo, eĉ interese.

Unu el rakontantoj, artileria kapitano, dum la Japana milito estis kaptita de Hunhuzoj, kiuj decidis mortpafi lin. Du horojn pasigis la militkaptito en mortagonio, atendante ĉiunminute la morton. La prokrasto estis kaŭzita de l' disputo inter la Hunhuzoj :

Kiu havos la honoron pafi la unua al la kaptita oficiro ?

La disputo estis varmega. Ŝajnas, ke la honoro de l' unua pafado al kaptito havas ĉe Hunhuzoj ian religian signifon. Neniu volis cedi sian rajton. La Hunhuzoj dividiĝis en partioj. El disputo fariĝis batalo. Ektondris la pafadoj ; falis teren la vunditoj kaj mortigitoj...

La tutan tempon la kaptito estis ligita al arbo kaj kun kortremo observis la batalon, kies rezultato estis por li egala. Kiu ajn venkus, la kaptiton minacis la morto. La plej terurajn minutojn, laŭ lia rakonto, la kapitano travivis, kiam el la tuta bando restis vivaj nur du Hunhuzoj.

Ankoraŭ momento, unu mortigos la alian, kaj tiam savo ne ekzistas.

La savo venis tute neatendite. Dum la interpafado ambaŭ kontraŭuloj elpafis ĉiujn kuglojn kaj volis jam komenci la manbatalon, kiam la kapitano trovis brilan penson. Li proponis al ili aranĝi vetkuron. La Hunhuzoj konsentis kaj ekuris tutforte.

Kiam ili malaperis el la vidkampoj, la kapitano distranĉis per la poŝtranĉilo la ŝnurojn, kiuj ligis lin, kaj saviĝis.

La rakontinto estis ŝufice rekompeucita por sia kuraĝo kaj trovemo ne tiom per aprobo de ĉeestantoj, kiom per rigardo de raviga dommastrino, kiu elpensis la amuzon per rakontoj.

La plej terura akcidento, komencis sian rakonton la doktoro, kiu konkuris kun la kapitano en ĉio, ne prezentas min en tiel favora lumo, sed ĝi prezentas kredeble tamen kelkan psikologian intereson.

Kaj la doktoro rakontis unu el ekscitaj historioj, ĉiam okazantaj al studentoj-medicinistoj, kiuj poste iĝas bonegaj babilantoj por Kristnaskaj vesperoj. Kiel ordinare okazas, la doktoro dum siaj studentaj jaroj, decidis foje resti dum nokto en la anatomia teatro, por senĝene prepari sin al la ekzameno.

Oni alportis por li por aŭtopsio la kadavron de alveturinta komercisto eksterordinare dika, kiu ekdiboĉis en la urbo kaj poste estis mistere mortigita en la ĉambro de l' hotelo. Pri la mortigo



parolis la tuta urbo. Estis tro nekomprenebla la malapero de l' mortiginto kaj kune kun li de granda monsumo, rabita ĉe l' komercisto.

Pensante pri la tragedia historio, la studento eĉ ne rimarkis, kiel alpasis la meznokto, kaj sukcesis dissegi nur la duonon de l' kranio ĉe la kadavro.

Rapidante fini la aŭtopsion, la studento kaptis la tranĉilon kaj estis preta sekci la ventron, kiam subite de tie aŭdiĝis voĉo :

He, vi, sinjoro studento, estu pli singarda tie ! . .

“ Sinjoro studento ” kiel decas en tiaj okazoj, rigidigis. (Ĝustadire, rigidigis ankaŭ la impresema dommastrino, al granda ĉagreno de l' kapitano).

Tiu efektive estis la plej terura minuto, ĉar post ĝi “ sinjoro studento ” vekis la gardiston kaj sendis al polico. La polico aperis kaj sekcinde la ventron de l' komercisto, trovis tie la sin kaŝintan rabiston kun la monujo en la manoj. Kiamaniere sukcesis la rabisto sin kaŝi tie, la doktoro pro la multaj jaroj pasintaj jam forgesis, sed la teruran minuton travivitan li memeros dum la tuta vivo.

La mastrino, tute tremante, per sia atento plene rekompencis la doktoron pro la emocio trasentita.

Kaj la atento estis turnita al la tria hejmmamiko, la advokato.

Li ĝis nun estis tute en profundiginte en la gazetlegadon kaj ŝajne aŭdis neniun el la rakontitaj teruraĵoj.

Eksciinte, ke estas lia vico, li iom hezitis kaj diris :

Sinjoroj ! Mi devas konfesi, ke la plej teruran el ĉio okazinta al mi dum la vivo, mi travivas en nuna momento. Ĝuste hodiaŭ matene mi sendis per poŝto al unu bona konatino tute konfidencan leteron. Kaj antaŭ kelkaj minutoj mi tralegis en la gazeto pri la “ nigra kabineto ” por revizo de la leteroj, kiu ekzistas ĉe la administrejo poŝta kaj telegrafa.

Tri foje mi duelis kaj, laŭ rakontoj de l' sekundantoj, mi estis plene trankvila. Sed nun, kiam mi ĉiuminute povas opinii, ke la honoro de mia bona amikino estas en danĝero, mi tremas, kiel knabo . . .

La advokato ne finis . . . Li fletis sin kun glaso da akvo al la dommastrino, kiu estis sveninta :

La kapitano kaj la doktoro rigardis malserene unu la alian.

Kaj la rekonsciiginta mastrino ridetis al la gastoj kaj diris mallaŭte :

Nenion signifas, sinjoroj, bonvolu ankoraŭ sidi . . . Mi estas tre nervoza . . .

Kaj nia ĉarma advokato rakontas tiajn teruraĵojn . . .

Elrusiĝis A. Ajspurit, instruisto

Ĉe Moskva instituto de Esperanto

5, Lubjanskij-Moskvo, Rus.

BIBLIOGRAFIO

La eldonistoj kiuj deziras ke Normanda Stelo raportu pri iliaj verkoj estas petataj sendi donace po du ekzempleroj de verkoj.

ESTU HOMO de Charles WAGNE, el la franca lingvo tradukis Sam Meyer. Libro rekomendita de la internacia unuigo de Esperantaj Verkistoj. Presa Esperantista Societo-Paris, 33, rue Lacépède, prezo sm 0.50 = fr. 1.25.

Tiu-ĉi libro montras sur sia kovrilo du bonajn rekomendilojn. 1^e oni legas : Rekomendita de la Internacia unuigo de esperantistaj verkistoj tio estas bona noto ; 2^e oni vidas la nomon de la tradukinto : Sam-Meyer. Oni memoras ke tiu lerta esperantisto tradukis ; Karmen — La Supujo — L'Avarulo — La Barbiro de Sevilla — Vojaĝo interne de mia ĉambro, kaj oni scias ke tiuj libroj estas modeloj pro la pureco de la lingvo. La nun recenzita libro estas pri tute malsimila temo, eble la tradukinto volis provi kaj pruvi sian kapablon por ĉuispecaj stiloj. La libro traktas pri moralo. Jen unu fragmenteto kiu montros al vi samtempe la libron kaj la tradukon :

« **Atentu pri la unua paŝo.** Ni supozu, ke, obeante vian aventuron mon, vi supreniris per kata vojeto ĝis la tegmento de via domo. « Kaj tie vi estas, sidante en la defluilo, kun la piedoj en la « malplenaĵo. Kion vi dirus, se mi konsilus al vi, ke vi lasu vin defali « ĝis la duono de la vojo kaj ke vi tie haltu ? Vi dirus : sed sinjoro, « kiam oni ekfalis en la malplenaĵon, oni ne povas plu halti, oni falas « das ĝis la fundo. Kaj vi estus prava. Atentu la deklivon al la « malbono ! Eraras tiu, kiu lasas sin gliteti sur ĝin, kun la intenco « halti ĝustatempe ».

En tia libro la kritikisto ne trovas sian feliĉon. La rimarkoj fareblaj ne estas multaj ĉar la lingvo estas pure klasika. Ni rimarkos la riĉecon de esprimoj precipe ĉe adjektivaj formoj : « Ni homoj malpli valorus ol ŝafista hundo, kiu alkuras, ne timante *peruŝgajn* kaj *perdentajn* ŝirojn ». — « Mi rigardas tian revon kiel *mallaborremulan* revon, kaj tian idealon, kiel *sentaŭgulan* kaj *dormemulan* idealon ». — « *Bestigaj* laboroj ». — « KREDU al mi, tio estas *vereca* parolo » — Kaj kiom delikate estas kvaliligita la laboranta azeno : « Laboranta azeno estas *majestulo*, kompare kun homo kiu nenion faras ». — Ni notu ke la tradukinto ne timas la formon simpligitan « komplika » « Ju pli ni posedas, des pli *komplika* estas la posedo, kaj grava nia respondeco ». Mi ne povas diri kial tiu riĉeco de adjektivoj min ravas sed inter la kaŭzoj mi ne silentos la jenan : ĝi nepre pravas la eraron de la plibonigistoj kiuj bezonas novajn sufiksojn kiam ili ne scias uzi la permesatajn, nek komprenas ke oni povas ilin eljeti en kelkaj okazoj.

Pri la prepozicioj “ al ” kaj “ en ” mi dubas ĉu la sekvantaj

frazoj estas ne kritikeblaj : « ĉu kontraŭstarante *al* nia prudento, aŭ male obeante *al* ĝi ? » persone mi evitus la demandon uzante akuzativojn : kontraŭstarante nian prudenton... — « Kelkaj homoj gardas sian proprajn *en* ekskluzivaj kaj malamikaj sentoj » — « Konsistus *en* » — « En mia parto, mi rigardas... » Mi scias ke oni ne obeas plu la konsilon de la unuaj vortaroj diri ekskluzive “ konsisti el ” tio estis fantazio trudita de lingvistikisto ; sed mi trovas ke la prepozicio “ en ” iĝas tro uzata “ en mia parto ” ne valoras pli ol “ miaparte, mia flanke, laŭ mia opinio ”. Kaj mi trovas “ en ” kun la verbo dormi : « Longe ludinte, la infano endormiĝas sur la ludloko ; longe aŭskultinte, la aŭdantoj endormiĝas en kunsidoj, la tro laciĝinta mehanikisto ekdormas sur sia lokomotivo ». Certe oni povas defendi la formon « iu iĝas en dormo » kaj tiel tiu anomalia formo invados la lingvon kaj restos en ĝi, sed ĝi enpenetras tra flanko pordo. Estas utile noti tiun detalon ĉar post kelkaj jaroj oni ne komprenus kial aŭdantoj endormiĝas dum mehanikisto ekdormas.

En la frazo pri la prepozicio *al* vi sendube rimarkis ĉu kaj aŭ responde unu de la alia, jen alia ekzemplo : « vi rimarkos, kiom da viroj kaj virinoj laboras por vi, ĉu per la mano, aŭ per la penso ». — Mi opinias ke oni devas diri ĉu, ĉu ĉe kelkaj okazoj kaj aŭ, aŭ ĉe aliaj. Ĉe la unua ekzemplo mi uzus : ĉu, ĉu, ĉe la dua : aŭ, aŭ.

La aŭtoro uzas la vorton “ sole ” kiam “ nur ” estus pli oportuna, kaj tion farante li obeas nacian kutimon : « respekti la apartenaĵon ne estas sole : ne preni » — « senlabora vivo estas ne sole vana entrepreno » — « Tiu ripozo ne troviĝas sole en la dormo » — Ankaŭ pro naciaj kutimoj li donas *al* la vorto “ aferoj ” signifon malprecizan kiu apartenas *al* “ aĵoj ” aŭ kiel mi vidis sub angla plumo *al* “ ioj ” — : « Ĉiu, en mazuro pli aŭ malpli granda, povas diri, ke iaj aferoj apartenas *al* li. Fine, pri la nova vorto “ Manipuli ” mi pensas ke ĝi devas resti en la teknika lingvo por la laboroj de la lernantoj de praktikaj sciencoj. Fiziko, Ĥemio. G. P.

ĈE la PIEDOJ de MAJSTRO de ALCYONE kun permeso tradukita de W. Mann. Presa esperantista societo, Paris, 33, rue Lacépède, prezo sm = fr. 2.50.

Tiu-ĉi malgranda libreto, bele bindita, pritraktas teosofiajn konsilojn. La traduko estas bona. Ni rimarkis : “ homon mortantan *de* malsato ”. Iom post iom la prepozicio *de* invadas la kampojn de aliaj ; morti *pro* malsato estis iam pli esperanta, sed ĉu tion diri ne estas sin montri grizbarbulo ?

Tute prave la aŭtoro uzas la vortojn realo kaj nerealo, sed apude, tute malprave, li ne kuraĝas uzi gravo kaj malgravo, utilo kaj senu-

tilo; kaj ankaŭ pli malprave li anstataŭas tiujn substantivojn per adjektivoj: "vi devas ankoraŭ memori, ke de la realo kaj la nerealo estas multaj specoj; ankoraŭ vi devas distingadi inter la bono kaj la malbono, la grava kaj la malgrava, la utila kaj la senutila, la vero kaj la malvero, la egoismo kaj la altruismo". G. P.

HISTORIO de la LINGVO ESPERANTO — Ed. Privat. Universala Esperanta librejo — 10, rue de la Bourse. Genève — Prezo ne montrita.

Tiu-ĉi libreto estas tute laŭdinda, kaj estas dezirinde ke la profesoroj uzu ĝin en la kursoj. Ĝi rakontas la faktojn kun granda vereco kaj kun perfekta sincereco. Mi persone bedaŭras ke la unuaj paĝoj ne estas pli detalaj. Tute prave S^{ro} Privat diras. "La historio de Esperanto ne komenciĝas kun si mem, sed jam kun la historio de siaj prapatroj". Tiu historio de Esperanto antaŭ ĝia ekzisto ŝajnis al mi tro mallonga, mi pensas ke multe da intereso sin kaŝas en tia studo.

Pri la lingvo S^{ro} Privat estas majstro. Mi rimarkis du frazojn: « En Germanujo daŭras propagandi S^{ro} Chr. S. » p. 30 — kaj « sed pri ŝanĝoj en la lingvo oni senĉese daŭris diskuti » p. 34. Se vole la aŭtoro uzas daŭri kaj ne daŭrigi li uzas la lingvon laŭ kompreno kiun mi prezentis al la legantoj de N. S., sed mi kredas ke multaj opinioj ke li eraris. G. P.

EKONOMIO SOCIA, kio ĝi estas kaj kion ĝi instruas, Dr Marchlewski. Esperanta scienca kaj literatura libraro — StratoRetoryka, 10 Krakovo Austro-Galicio Prezo: spm 0.10 = fr. 0 : 5.

Tiu studo prezentas kiamaniere oni povas plej bone profiti la fruktojn kaj fortojn de la naturo por utili al la homaro, kaj kiel homoj povas helpi al si reciproke. Ni citu tiun interesan paĝon de la libro, kiu samtempe montras la bonecon de la traduko de S^{ro} E. Pfeffer: « Kio estas necesa por ke estu preta perkala ĉemizo? Estas necese, ke oni, en Unuigitaj Ŝtatoj, plantu kotonkreskaĵojn en iu bieno, ke la laboristoj kolektu de ili la maturan frukton, kaj poste per helpo de maŝinoj purigu la kotonon, paku ĝin kaj sendu sur la fervojan stacion. La vagonaro veturis ĝin al haveno, de kie per ŝipoj oni sendis la pakojn al Odessa; tie rusaj laboristoj elŝipigis ilin kaj metis sur alian vagonaron irantan al Ladzo. Tie, okupiĝis polaj laboristoj kiuj ŝpinis el ĝi ŝpinaĵon sur maŝino venigita el Anglujo, fabrikita de anglaj laboristoj per bona ŝtalo ricevita el minajo devenanta el Hispanujo aŭ Svedujo kaj per ligno devenanta el Australio. La ŝpinaĵon oni poste veturigis en la teksejon, kie teksis ĝin pola teksisto per mekanika teksilo, venigita el Germanujo, post kio la kruda teksaĵo iris en la manojn de la blankigistoj, uzantaj por sia laboro maŝinojn kun kaldronoj, farataj el kupro, elterigita ie en

Uralo aŭ Ameriko kaj ĥemiaĵon produktatajn en Varsovio. La preta teksaĵo estis deponita en pogranda vendejo, tie aĉetis ĝin la posedanto de tolaĵ fabriko kaj la kudristino kudris la ĉemizon per kudromaŝino fabrikita en Germanujo aŭ Ameriko ».

Kiom da niaj legantoj pripensas la ĉi-supran laboron, kiam ili vestas sin per sia dimanca ĉemizo ?

Kiel ni diris, la traduko estas bonega. Ni nur rimarkis la vortojn: invento (eltrovo), kvestio (demando), erao (fr. ère). G. G.

PROPAGANDA PIEDVOJAĜO al la oka internacia Esperantista Kongreso de S^{ro} Devjatnin. Presejo Janich, Gabelsbergerstrasse 76, Munchen. Prezo sm 0.75.

Niaj legantoj scias ke du esperantistoj S^{roj} Devjatnin, ruso, kaj Romano, turko, faris piede la vojaĝon de Parizo al Krakovio, vojaĝon de 1778 kil, dum 40 tagoj. En tiu broŝuro la aŭtoro rakontas sian vojaĝon, siajn aventurojn en ĉiuj trapasitaj urboj, kie li parolis pri esperanto, disdonis multajn esperantistajn propagandilojn kaj trovis la helpon de preskaŭ ĉiuj delegitoj de U. E. A. La stilo estas tute bona kiel konvenas al lingvokomitatano. Nur krom kelkaj preseraroj, ni rimarkis la vortojn : ĝandarmo (ĝendarmo), tutuitan (tutuitan), bicikledo (biciklito), hotika (eble gotika) kaj sedojn (?).

Ni do esperu ke tiu « globtrotera » propagandrimedo utilos al nia kara afero. G. G.

ESPERANTO POŝ-BIBLIOTEKO n^o 1. La PREMIITO novelo originale verkita en Esperanto de Hersckel S. Hall Cleveland Ameriko. Librejo Esperanto. Tverskaja 26. Moskvo Rusie - Prezo sm. 0.05.

Drama epizodo de la vivo de juna ministro, Roberto, dekokjara, laborema kaj inteligenta, kiu por perfektigi sin en la mineja maŝinaro intencas viziti Anglujon, Germanujon kaj Francujon. Por sukcesi li lernas kun sia patrino la lingvon « Esperanto », kiu permesos al li rilati kun la laboristoj de la tri landoj. Sed ĉar ankoraŭ li bezonas monon por la vojaĝo, li decidas partopreni en esperantista konkurso, kies premio estas ducent spesniloj.

La rakonto estas tiu de lia propra vivo ; sed bedaŭrinde antaŭ ol li povu plenumi sian deziron, oni alportas lin hejmen, iun tagon, mortigitan en la minejo. Lia patrino finigas la rakonton kaj ĝin sendas sub lia nomo al la konkurso. La verko estas tiel kortuŝanta ke li gajnas la premion.

Kiam la patrino ricevas la leteron sciigantan al ŝi la rezulton, ŝi kuŝas malsana en ŝia lito. Ŝi rapide vestas sin kaj kuras al la tombejo, malgraŭ pluvo ; sed morgaŭan tagon, oni trovas ŝin senvivon sur la tombo, kie oni legas la nomon de la premiito.

Mirinde skribita en tute korekta kaj eleganta esperanto, tiu broŝuro devas esti legata de ĉiuj. G. G.

VERKOJ RICEVITAJ PRI KIUJ RECENZO VENOS POSTE

PREMIER MANUEL d'ESPERANTO par A. Saharov. — Librejo Esperanto
3 Lubjanskij proezd, Moskvo, Russie — Prezo : 5 kopek.

La KAMENA ANGULO - Familia dramo en du aktoj de Craven — Presa Esperantista societo, 33, rue Lacépède, Paris — Prezo : spm 0.300 : fr. 0.75.

EKSPozICIO INTERNACIA PRI MARAFEROJ, MARA HIGIENO, KAJ
ITALA ELMONTRO KOLONIA — Marsano, 24, corso Buenos Aires, Genova.

BRESLAU — Vortpentraĵo de Hujo Kretschmer - Gvidlibro esperantigita de
loka grupo Breslau — Sro Mahn, Albrechtstr 43, Breslau, German.

GVIDFOLIO TRA BRESLAU, Silezio, Germanujo.

GVIDFOLIO TRA LETCHWORTH, ĝardenurbo, Hertfordshire, Anglujo.

VOJAĜADO en FINNLANDO, eldonita de Esperanto Asocio Finnlando, Presejo de Puromies Lappviksgatan 7, Helsingfors.

AŬTUNAJ FLOROJ — Dek originalaj poemoj de D^{ro} Stanislav Schlhof en
Pardubice (Bohême) — Universala esperantia librejo, 10, rue de la Bourse,
Genève — Prezo : spm 0.25.

INFORMOJ

Ĉiuj Grupoj Delegitoj kaj Samideanoj estas insiste petataj sendi antaŭ la 15^{an}
de ĉiu monato pri interesaj okazintaĵoj en nia movado raportojn
Tiuj informoj, kiel eble plej mallongaj, estu prefere skribitaj esperante

Por sekretariinoj kaj sekretarioj. — Ofte membroj plendas ke
neniam ili legas en nia bulteno pri la agado de sia klubo. Vere ili ofte
rajton havas ĉar okazas multaj kaj kelkaj gravaj kunvenoj aŭ festoj
pri kiuj neniam la redakcio ricevas eĉ raporteton. Sendu viajn mal-
grandajn raportojn, karaj gesamideanoj, pri ĉio kio koncernas vian
lokan propagandon, kaj montru unu la alian kiamaniere oni povas
varbi.

Naŭta Universala Kongreso. — Berne 24 - 31 Aŭgusto
D^{ro} Zamenhof ĵus sciigas la Direktantan komitaton ke li ĉeestos la
kongreson kun ilia tuta familio.

La organiza komitato sukcesis lui novan kazinon por festoj kaj
kunvenoj kies la granda halo enhavas sidlokojn por 4.500 personoj.
Kiel teatraĵon, oni ludos la originalan dramon *la Patreco* verkitan
de samideanino Wolf en Chaux-de-Fonds.

La 31^{an} de Aŭgusto, belegafesto por la Esperantistaro sur Gurten,
monto 860 metroj alta proksime de Bern.

L'ouverture du 9^{me} Congrès international de Berne aura lieu le
Dimanche 24 Aout. — Mercredi 27 : Excursion dans les Alpes Ber-
noises. — Jeudi soir, au Casino : Bal en costumes nationaux et
représentation du drame *La Patreco*. — Dimanche 31 : Réunion des
Congressistes sur le Mont Gurten, près de Berne — Grande Fête
populaire.

La carte de congressiste coûte 15 francs (carte supplémentaire
pour les membres d'une même famille autre que le chef : 7 fr. 50).

Prix des logements pour sept jours : chambre et petit déjeuner pour francs : 18 - 14 - 12 et 8.50. Chambre et trois repas pour frs : 63.75 - 50 - 37.50 et 27.50.

Prix du chemin de fer, de Paris à Berne : francs 42.50 (2^e classe), 27.50 (3^e classe).

Por pravi al ĉiuj la fortecon de esperantista movado estus necese ke ni iru multenombroj en *Gand* (Belgujo) dum la semajno esperantista ; kaj almenaŭ en *Bern* ĉefurbo de libera lando !

Concours Michelin. — Les résultats du concours national d'Esperanto, doté de 20.000 francs de prix en espèces par MM. Michelin, industriels, viennent d'être publiés ; nous avons appris avec plaisir les suivants et félicitons les professeurs.

A Bolbec, M. Paton reçoit un prix de 200 francs et est classé parmi les 29 premiers. Il devra subir une troisième épreuve à Paris. MM. Lemaitre et Bardet, chacun un prix de 20 frs et 20 frs de livres.

Le groupe *Esperanta Stelo*, de Sotteville-lès-Rouen, dont les cours sont professés par M. Robin, avait également présenté six candidates âgées de moins de 19 ans comme l'exigait le programme ; toutes les six ont subi avec succès les deux séries d'épreuves. Ce sont : M^{les} Marie Bigot, Céline Capon, Suzanne Douillet, Adrienne Henry, Esther Leroux, Henriette Moncel. Elles recevront chacune 20 francs et des volumes d'Esperanto. De plus elles pourront faire une promenade dans les airs, à bord d'un aéroplane piloté par M. Henry Farman, qui est lui-même un fervent esperantiste.

Succès. — A la suite de brillants concours, M. Duteil, Rédacteur des Postes et Secrétaire du Groupe de Rouen, a été admis à l'Ecole Supérieure des Postes et Télégraphes. — M. de Beaupuis, Contrôleur des Douanes, à Rouen et Membre du Groupe Esperantiste a été nommé vérificateur et affecté à la résidence de Calais. *

A la distribution des prix du Groupe de Sotteville le professeur ROBIN a reçu un diplôme du Ministre de l'Instruction Publique....

Propagande. — Lors de la fête nationale, nous avons eu la joie de voir à Rouen de nombreux drapeaux Espérantistes mélangés aux pavillons nationaux. Dans la rue La Fayette et, sur la place Saint-Sever, voies par lesquelles la foule s'est dirigée pour assister à la revue des troupes, on a particulièrement remarqué les drapeaux posés chez M. Chanut, Négociant en charbon, M^{lles} Le Magnen, Modistes, M. Leclerc, Coiffeur, M. Flaman, Charcutier. Se oni ne parolis en Esperanto, oni multe parolis pri Esperanto.

Pour répondre au désir qui lui en a été exprimé, *Normanda Stelo* publiera, dans un prochain numéro, la comédie : *Le Fiancé Malchanceux* qui a remporté, un si légitime succès, lors du Congrès de Bolbec.

**Principaux Avantages réservés
aux Membres du
Groupe Espérantiste de Rouen**

1. Service gratuit du Bulletin mensuel illustré *Normanda Stelo*.
2. Correction gratuite des thèmes et versions esperantistes.
3. Cours gratuits de langue espéranto.
4. Traduction gratuite de lettres commerciales et cartes postales esperantistes.
5. Consultation gratuite à la bibliothèque, des principaux journaux et ouvrages de la littérature esperantiste.
6. Excursions et voyages à prix réduits.
7. Remises importantes dans les principales maisons de commerce, etc.

LUEBLA

LA BONNE LORRAINE

1, Rue Verte, ROUEN

SOUVENIRS DE ROUEN

CARTES POSTALES



CONFISERIE

Remise 5 % aux Espérantistes

L'ESPÉRANTO est une langue auxiliaire que tout homme civilisé doit savoir à côté de sa langue maternelle.

L'ESPÉRANTO a un vocabulaire vraiment international. C'est une langue très souple qui se prête à tous les usages.

L'ESPÉRANTO, langue neutre ne tend pas à supplanter les idiomes nationaux, mais vise à servir aux relations internationales entre personnes de langues maternelles différentes.

AVANTAGES : Facilite le commerce, le développement des sciences, les voyages à l'étranger; met à la portée de tous les peuples la littérature de chaque pays; aide au maintien de la concorde internationale; économise un temps précieux à tous ses adeptes, leur permet de mieux connaître leur langue maternelle et d'acquérir des connaissances techniques plus étendues.

DIFFUSION. Plus d'un million d'adeptes dans toutes les parties du monde: 100 journaux; 1800 sociétés. Parlée couramment par des voyageurs, touristes, commerçants, etc. Pendant les huit Congrès esperantistes internationaux (Boulogne-sur-Mer 1905, Genève 1909, Cambridge 1907, Dresde 1908, Barcelone 1909, Washington 1910, Anvers 1911, Cracovie 1912), des milliers de personnes, relevant de 30 langues différentes ont, pendant huit jours, et rien qu'en Espéranto, traité des questions les plus diverses.

Les sacrifices que fera tout homme de notre monde européen en consacrant quelque temps à l'étude de l'Espéranto sont tellement petits et les résultats qui peuvent en découler sont tellement immenses qu'on ne peut pas se refuser à faire cet essai.

Tolstoï.

QUAND VOUS AUREZ LU NORMANDA STELO... DONNEZ-LE A UN AMI

LEGANTOJ DE " NORMANDA STELO " sendu al ni korespondkarton kun sciigo ; 1. kio plaĉas al vi en nia gazeto, 2. kio malplaĉas al vi, 3. kion vi al ni konsilus por plibonigi la enhavon. Ni, laŭ eblo, respektos, ĉiun saĝan deziron.

Al ĉiuj abonantoj kaj amikoj de Normanda Stelo, ni rememorigas ke ili bonvolu renovigi lian abonon sendante la abonprezon 2 frankoj (0.800 spm) al nia administracio. Ne prokrastu ĝis morgaŭ, ĉar vi povas pagi hodiaŭ.

Normanda Stelo petas tiujn personojn, kiuj deziras ricevi de ni leteran respondon, ke ili bonvolu sendi al ni francan poŝmarkon, aŭ internacian respondan poŝkarton aŭ poŝtan respondkuponon.

La manuskriptoj devas esti skribitaj *plej legeble* nur sur unu flanko de l'papero. La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la presotajn manuskriptojn. Nepresitajn manuskriptojn ni ne resendas.

Normanda Stelo al siaj kunlaborantoj volonte sendas senpage po 5 ekzempleroj — de tiuj numeroj, kiuj enhavas iliajn originalajn artikolojn — se ili tion deziras. En okazo de forgeso ni petas, ke ili bonvolu resciigi nin pri tiu deziro *post* la apero de l'artikolo, kaj ni tuj ekspedos la postulitajn ekzemplerojn.

Normanda Stelo, organe officiel de la Fédération Espérantiste Normande, a pour but essentiel d'aider tous les propagandistes dans leurs efforts pour répandre la langue internationale créée par le Docteur Zamenhof et contrôlée dans son développement par le Lingva Komitato.

Abonnement : un an 2 fr. Abonnements collectifs un an : 7 fr. pour 10 exemplaires chaque mois, *expédiés sous une seule bande, à une seule personne, qui se charge de la distribution du journal et en règle le montant.*

Normanda Stelo accepte avec reconnaissance toutes les collaborations tendant à son but. MM. les Présidents et Secrétaires des Groupes sont instamment priés de veiller à ce que les renseignements concernant leur région soient exacts et complets.

Normanda Stelo attire l'attention des étrangers sur notre province, elle y amène des touristes. Elle favorise les affaires commerciales par l'Espéranto. Elle ne fait connaître que des maisons dignes de confiance et attire sur elles l'attention spéciale de tous.

Normanda Stelo se charge de transmettre les abonnements à tous les journaux espérantistes. Elle est à l'entière disposition des syndicats d'initiative pour la distribution gratuite des guides.

Nous recommandons spécialement à nos sociétaires et à tous les Espérantistes, les commerçants qui nous aident en insérant leurs annonces dans notre bulletin. Toutes les maisons recommandées sont dignes de confiance. Les acheteurs auront toujours avantage à se faire connaître comme Espérantistes à ces commerçants. "N. S."

ESPERANTISTA KONGRESA KALENDARO

27 juillet. — Hago - Jara Kunveno de la Nederlanda Societo.

14 Aoŭt. — Gand - Internacia Semajno Esperantista.

19 Aoŭt. — Stuttgart - Congrès National Allemand.

24 Aoŭt. — Berne - IX^e Congrès International.

31 Aoŭt. — Milan - 4^e Congrès Italien.

7 Sept. — Rome - 4^a Internacia Kongreso de Katolikoj.

Juin à Septembre — Hertogenbosch (Nederland) Ekspozicio de Antikva religia arto.

Mars à Novembre 1914 — Genova - Ekspozicio Internacia pri maraferoj - Mara higieno kaj itala elmontro kolonia.

1914 - Paris - X^{me} Congrès International.

ELDONOJ DE NORMANDA STELO

Studo pri la Vortfarado de Esperanto, originale verkita en Esperanto
de Doktoro Panch.

ELCERITA

Gvidlibro tra Rouen - Volumo bele ilustrita 107 paĝoj afrankite fr.

0.60

Gvidlibro tra Le Havre kaj Bolbec bele ilustrita du respondkuponoj afrankite fr.

0.50

ESPERANTIO

*Le Bourgogne Mousseux des Espérantistes de notre samideano Gaslon CHARCOUSSET
doit se trouver sur toutes les tables*

La bouteille emballée : fr. 2, 2.50, 3 et 3.50 - Livraison par caisse de 6, 12, 18, 24 etc. bout. assorties ou nom

Adresser commande avec mandat à l'agent général :

G. PION-MULLER, Esperantio, 21, rue de Lorraine, BEAUNE (Côte-d'Or)

GESAMIDEANOJ ! Se vi deziros ke la lingvo Esperanto progresu, bonvolu diri al
la komercistoj kiam vi aĉetas ke vi estas esperantisto.

FIRMOJ !

Atentu ke se vi volas ĉiam progresadi estas necesa por vi
anonci en esperantistaj ĵurnaloj !

POURQUOI ne vous réservez vous pas la Clientèle des espérantistes en inscrivant
votre Maison parmi les annonces de "Normanda Stelo".

JAPAN TRADE REVIEW, grava monata ilustrita japana gazeto nun redaktas
parton de sia teksto en Esperanto. Tiu rezulto estos bonega por nia propa-
gando en oriento. — Skribu esperante poŝtkarton por peti specimenon al
Administracio de Japan Trade Review, 4, Yurakucho - Ichome, Tokio,
Japanlando.

Petite Correspondance Internationale

Malgranda Korespondado Internacia

Ne komercaj anoncetoj por intersaĝo
de poŝtkartoj, poŝtmarkoj, fotografiaj
glumarkoj, leteroj, ĵurnaloj kaj similaj,
(5 centimoj por ĉiu vorto por ne abo-
nintoj), (ne page por abonintoj).

ABONNEMENTS INDIVIDUELS REMBOURSABLES

*L'Abonnement à Normanda Stelo
ne coûte rien puisque les abonnés
peuvent faire gratuitement une in-
sertion sous la rubrique ci-contre.*

*Esperantajn Sigelmarkojn kolektas kaj intersaĝas H. Bobs, Gertrudentrasse
17, Lubeck, Germ.*

Mlle SONNET "Les Rosiers" à St-Pair-sur-Mer (Manche) désire recevoir
médailles commémoratives civiles ou religieuses et cartes postales repro-
ductions salons 1913. Remerciera selon désir.

*Situations d'Avenir. — L'Argus de la Presse (55^e année d'existence) offre, dans
chaque commune, à nos lecteurs et lectrices, surtout à ceux ayant de
nombreuses relations, des situations de grand avenir, sans quitter notre
région ; une certaine instruction est nécessaire.*

Ecrire : ARGUS, 37, rue Bergère, Paris.

" LA ONDO DE ESPERANTO " MONATA ILUSTRATA REVUO

La abonantoj de 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj "Princo Serebr-
janiĵ", kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1.60 af. Nun ĉiu abonanto de la j.
1913 — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper. libron:

" ORIENTA ALMANAKO "

el la lingvoj japana, h'ina, araba, turka, hinda, sanskrita, persa, armena

"La Ondo" aperas akurate la 1-an. Ĉiu n-ro havas 16-24 paĝoj.

La abonpagon 2.120 Sm. 3.30 frcs oni sendu poŝtmandate, respondkupone al librejo
"Esperanto" (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al Normanda Stelo.

SENDU du respondkuponojn por ricevi poste unu ekzempleron de

ESPERANTISTA GVIDLIBRO EN ROUEN

Desegnaj'oj de J. Girieud

— 107 pag'oj —

Prezo : 60 centimes

Vendata de "NORMANDA STELO", 41, rue de la Vicomté, ROUEN



CORDONNERIE DU PALAIS
Chaussures de Luxe et de Travail.

V^{ve} R. HERMEL

1, Rue Rollon, 1 -:- ROUEN

ESCOMPTE 5 % AUX ESPÉRANTISTES

FOURNITURES GÉNÉRALES POUR CAVES
MACHINES A RINCER ET BOUCHER LES BOUTEILLES
PORTE-BOUTEILLES ET ÉGOUTTOIRS

Porte-fûts robinets, cire, capsules, etc.

Maison DUVAL Frères

V^o G. DUVAL et H. SCHEFFER, succ^{rs}

18, rue Alsace-Lorraine, ROUEN. - Tél. 9.54

Ateliers de Fabrication et de Réparation

55, 57, rue des Augustins

A cette adresse : Magasin de vente d'Articles de Laiterie

A LA NOUVELLE MAISON
Anciennement **A LA MAISON D'OR**
54, Rue d'Amiens, 54

A. GORAT

196, 198, 245, Rue Eau-de-Robec - ROUEN

Matelas, couvertures, tapis, vente et achat de mobiliers

MEUBLES Neufs et d'occasion

AMEUBLEMENTS EN TOUS GENRES

Maison de confiance, — Ne pas confondre

Bien s'adresser à la « NOUVELLE MAISON »

LAVEUSES DE LINGE
AMÉRICAINES

Agence de Rouen

39, rue du Faubourg-Martainville

près le Champ-de-Mars

On demande des Agents

Grands Magasins DU LINGOT D'OR

60, 62, 64, rue du Bac et rue des Fourchettes, ROUEN

Nouveautés, Ameublements en tous genres, Confections pour hommes et jeunes gens, pour dames, fillettes et enfants, Chaussures, Chapellerie, Lingerie, Bonneterie et Parapluies. Articles de Chauffage et d'Eclairage, Faïence et Porcelaines, Horlogerie, Bijouterie et Glaces.

Capital 100 millions

CRÉDIT DU NORD

25 millions versés

SIÈGE SOCIAL A LILLE

SUCCURSALE DE ROUEN, 68, rue Jeanne-d'Arc (en face la Poste)

Escompte et Banque. — Achats et Ventes de titres. — Paiements de tous Coupons. — Location de Coffres-forts avec tarif décroissant suivant durée et dimensions. — Garde de Titres.

SI

VOUS AVIEZ FAIT INSÉRER UNE ANNONCE

A CETTE PLACE

. . . ELLE AURAIT ÉTÉ CERTAINEMENT REMARQUÉE

Groupe Esperantiste de Rouen - Communiqué. — En présence du succès obtenu par les promenades à Montigny, à Bolbec et à Saint-Adrien, il a été décidé de faire un nouveau pique-nique qui a été fixé au Dimanche 27 Juillet. Aller par chemin de fer à la Londe - Retour par le bateau de La Bouille - Rendez-vous à la gare de Rouen-Orléans à 8 h. 1/4. - On peut emporter des provisions.

LE GUIDE ILLUSTRÉ DE ROUEN EN ESPERANTO

0 fr. 50, chez Blondel, rue Cauchoise, 21, Rouen

a sa place marquée dans la bibliothèque de tout homme de goût en Normandie, et dans la poche de tout touriste avisé



19, QUAI DU HAVRE, ROUEN — TÉLÉPH. 1204
R. W. SYLVESTER FILS
 REMISE 5 0/0 AUX ESPÉRANTISTES
 HUILES D'OLIVES D'ITALIE, PROVENCE, ALGÉRIE, ESPAGNE

GRANDE BRASSERIE NATIONALE

33, Rue de la République, ROUEN

Téléph. 950 RESTAURANT A TOUTE HEURE Téléph. 950

Maison Fuhr LHIRONDEL et KUBIKS ^{rs}

51, 53, rue Grand-Pont, ROUEN

ORTHOPÉDIE, BANDAGES, INSTRUMENTS DE CHIRURGIE

Spécialité de Corsets de Toilette pour Dames et Fillettes

GRAND HOTEL BARETTE

Téléphone 2068

JOURNÉE POUR VOYAGEURS

A 6.50 & 7

ÉCLAIRAGE ÉLECTRIQUE

Garçon de Courses

Salons pour Noces et Banquets - On reçoit Touristes en Groupes

ANCIENNE M^{ON} LELOUP

35 et 37, Place Carnot (en face la gare d'Orléans) ROUEN

GRANDA HOTELO DE L'GLOBO

LA GEMASTROJ

PARIS — 71, strato Monge

ESTAS ESPERANTISTOJ

Ĉambroj de 2 ĝis 5 frankoj tage

ELEKTRA LUMO * * * * HEJMA TELEFONO

POMPES FUNÈBRES

Les familles ont intérêt à éviter les intermédiaires, souvent très onéreux, elles peuvent s'éviter sans frais supplémentaires toutes démarches en s'adressant elles-mêmes au Service municipal des pompes funèbres, ou en faisant appeler à leur domicile un employé de ce service. S'adresser

102, rue de la République, Rouen, et 39, rue Benoist, St-Sever. Tél. 187



MAISON
THE HIGH LIFE
TAILLEUR

VOUS SEREZ BIEN
HABILLÉ

6 RUE GRAND PONT
ROUEN

PRIX MODÉRÉS



MAISON SPÉCIALE

LINOLÉUM UNI

et Imprimé

Linoléum Incrusté

LEDRU & C^{IE}

19, Rue de la République
 (Coin de la Rue St. Denis)

ROUEN

Papiers Peints

Toiles Cirées

Tapis — Carpettes

Moquettes

CHARBONS

et
BOULETS

pour
foyers domestiques

22, rue Jeanne-d'Arc, ROUEN, Téléph. 20.08

A. Lemoine & ses Fils

seuls fabricants des

BRIQUETTES

pour
générateurs

Marque A. L.

BOULETS OVOÏDES LEMOINE

Caravanes pour le 9^e Congrès Espérantiste à Berne

1^o Départ de Paris 23 Août vers 22 heures. arrivée à Berne le 24 vers 10 heures, en 3^e classe, rabais 40 0/0, s'adresser à M. Souchay, 134, Boulevard Excekmans, Paris, 16^e.

2^o En bicyclette, départ de Paris 17 Août 6 heures, arrivée à Berne le 24 vers 15 heures, s'adresser à M. Leclerc, Hotel du Globe, 71, Rue Mauge, Paris.

3^o Rouen, Gand, Strasbourg, Stuttgart, et Berne, jonction à Gand avec la Caravane anglaise, s'adresser à M. Etard 14, Boulevard Cauchoise, Rouen.

Pour profiter de ces Caravanes, il faut être membre de l' U. E.

L'ÉGLANTINE

82, Rue Jeanne-Darc, ROUEN

COURONNES en tous genres

Fleurs artificielles

PLANTES D'APPARTEMENT

TÉLÉPHONE 472

CHEMISIER

COLOMBE, 62, Rue Jeanne-d'Arc, ROUEN

COUPE & QUALITÉ GARANTIES

Grand choix de Tissus haute nouveauté

CHEMISES SANS BOUTONS

CHEMISETTES SUR MESURE, façon chemisier

Envoi du catalogue sur demande

TÉLÉPHONE 12.60

AUX AUTOMOBILISTES !

USINE DE RÉPARATIONS DE PNEUMATIQUES DU CHAMP-DE-MARS

OUTILAGE PERFECTIONNÉ 9, Boulevard Gambetta, 9 Téléphone 15.20

Usine à vapeur, électrique et hydraulique. Réparations défiant la concurrence d'enveloppes éclatées et chambres à air
Réchapages anti et lisses. — Achat de déchets "Chambres à air"

TROUSSEAUX & LAYETTES

Spécialité de Toiles

Lingerie fine

Linge de Table....

Mouchoirs

M^{on} Lucas-Leclín

CH. LUCAS, SUCC^r

11, rue du Change - 12, rue Grand-Pont. — ROUEN

VESTAJOJ POR VIROJ, JUNULOJ KAJ KNABOJ

THIERY kaj MARTIN 32, 34, 36, Rue de la République

— ROUEN —

— DRAPOJ, VESTOJ, ĈAPOJ, ĈEMIZOJ —

APPRENEZ L'ESPERANTO

Les Gérants: LIÉBARD, LEROUX.

Imprimerie BLONDEL, 21, rue Cauchoise à Rouen.